

Enskribo

pri la jarkunveno okazinta la 4an de februaro 1958 en la klubejo en hotelo Slovan. Ĉeestis 38 klubanoj. Je la 20,30 malfermis s-ano Vondroušek la jarkunvenon kaj sciigis, ke la avizita parolado de membro de la Urba Komitato de la Kompartio ne okazos, ĉar la invitita k-ado ekskuzis sin. Ankaŭ la nova estrino de Domo de Kulturo de urbo Brno s. Honců kaj la mastrumanto s. Friedrich ne venis. S-ano Vondroušek skizas en enkondukaj vortoj laboron de nia klubo, persistadon ĉe niaj idealoj kaj grava kultura aktivado. Poste laŭ invito de la prezidanto tralegis s-ro Kořínek la sekretarian raporton, kiu sur 6 paĝoj priskribas la situacion en la mondo kaj ĉe ni en rilato de nia movado kaj citas la kompletan agadon de nia rondeto. Post aprobo de la raporto donas s-ano Borkovec kasistan raporton, el kiu evidentas, ke ni komencas mastrumi kun nula kasa stato, ĉar nia bonhavo ĉe la Domo de Kulturo Kčs 992,- laŭstatute estas forprenata de la Domo de Kulturo. En la objetoj sekvintaj post la kasista raporto pluraj membroj esprimis sian malkontenton pri la perdo de nia pene akirita rondeta bonhavo. Tiu ĉi sistemo devigis nin mastrumi malpli rigore. Post la raporto de la bibliotekisto s-ano Ballay, kiu anoncas, ke li ordigis en 50 horoj la bibliotekon kaj postulas iun keston aŭ ŝrankon por povi forpreni arkivaĵojn el la biblioteko, estis aprobata absolutorio al la ekŝiganta komitato. La kunveno elektas kiel prezidanton de la estrarelektita kunveno s-anon Solčany kaj el sia mezo kvinmembran balotkomisionon, kiu konsistas el s-anoj Svoboda, Svozil, Němec, Svozilová kaj ...? Post kvinminuta paŭzo s-ano Solčany remalfermas la elektan kunsidon kaj invitas, ke la membroj proponu iun por la prezidanta funkcio. Venas du proponoj pri s-ano Vondroušek kaj la sekvigita voĉdonado ĉiesvoĉe akceptas tiun proponon. S-ano Solčany transdonas la pluan gvidon de la kunveno al la nove elektita prezidanto Josef Vondroušek, aprezante samtempe liajn grandajn meritojn pri la movado kaj nia rondeto kaj emfazante, ke pli bonan elekton ni ne povis fari. S-ano Vondroušek legas la kandidatliston prezentitan de la elekta komisiono kaj voĉdonigas pri ĝi. Estis ĉiesvoĉe akceptita kandidatlisto de la nova komitato en jena konsisto: Marie Adamcová, Josef Friedrich, Tomáš Borkovec, prof. Vilibald Scheiber, Dro inĝ. Jaromír Šikula, Jiří Kořínek, Marta Lorková, Nelly Zitová, Oldřich Kaláb, Miloslav Němec, Sáva Střelec, Josef Ballay. Post fermaj vortoj de la prezidanto estis la kunveno finita.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la unua komitata kunveno la 4an de februaro 1958 en la klubejo je la 21.45 h. La novelektita komitato kunvenis sub la prezido de s-ano Vondroušek kaj estis distribuitaj jenaj funkcioj: vicprezidanto Josef Friedrich, la sekretario Jiří Kořínek, lia sekretario Marie Adamcová, kasisto Tomáš Borkovec, junularaj aferoj Marta Lorková, aferoj artprogramaj prof. Vilibald Scheiber, bibliotekisto Josef Ballay, komitatanoj Nelly Zitová, Dro inĝ. Jaromír Šikula, Miloslav Němec, Sáva Střelec kaj Bedřich Kaláb. Post kelkaj informoj de la prezidanto la kunveno estis fermita je la 22.30 h.

Enskribis Jiří Kořínek